

Joseph Freiherr von Eichendorff,
Postsonoroj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi sonĝis, ke revidis
La hejman valon mi,
Ĉe l' patra dom' mi sidis,
Jen alte super ĝi.

Tra l' foliar' blovetis
Aero ĉirkaŭ mi,
Kaj super min faletis
Floretoj de tili'.

Sed kiam mi vekiĝis,
La lun' de l' vojo-rand'
briletis kaj vidiĝis
Ĉirkaŭe fremda land'.

Jen estis nur glacia
Frosteco kaj blankek';
Blankiĝis ankaŭ mia
Harar' pro maljunec'.

*Traduko de la Germana poemo "Nachklänge" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-04-23.*

MR-092-1 / Arg-231-456 (2004-04-23 11:27:05)